"malgrava." Alicio povis mem vidi tion, ĉar ŝi staris sufiĉe proksime por rigardi sur la ardezojn. "Tamen tio ne esta grava" ŝi pensis.

En tiu momento la Reĝo subite ordonis "Silenton!"—Li ja en la lastaj minutoj diligente skribis en sia notlibro—kaj nun li legis el tiu libro: "'Regulo Kvardekdua' '*Neniu persono, kies alteco superas unu kilometron, rajtas resti en la juĝejo.*'"

"*Mi* ne havas tian altecon" protestis Alicio.

"Vi havas" diris la Reĝo.

"Preskaŭ *du* kilometrojn" aldonis la Damo.

"Nu, ĉiuokaze mi ne volas iri" diris Alicio. "Plue, tio ne estas vera regulo; vi ja ĵus nun elpensis ĝin."

"Kiel vi kuraĝas tion diri?" diris la Reĝo. "Ne estas en la libro eĉ unu regulo pli malnova!"

"En tiu okazo, ĝi devis esti la unua" kritikis Alicio.

La Reĝo paliĝis kaj tuj fermis la notlibron. "Konsideru la verdikton" la diris al la ĵurintoj per mallaŭta trema voĉo."

La Blanka Kuniklo eksaltis ekscitite.

"Se plaĉas al via Reĝa Moŝto" diris li "ni ankoraŭ havas pli da evidenco por aŭskulti. Oni ĵus trovis tiun ĉi paperon."

"Kion ĝi enhavas?" demandis la Damo.



"Ne ankoraŭ mi malfermis ĝin" diris la Kuniklo; "sed ĝi ŝajnas esti letero skribita de la juĝato al—al iu."

"Nepre al *iu*" diris la Reĝo "escepte se ĝi estas skribita al Neniu, kaj ordinare oni ne skribas al *li*."

"Al kiu ĝi estas adresita?" demandis unu ĵurinto.

"Ĝi tute ne estas adresita" diris la Blanka Kuniklo. "Fakte, nenio estas skribita sur la eksteraĵo."

Dirante tion li malfaldis la paperon, kaj aldonis:—

"Post ĉio dirita, ĝi ne estas letero; ĝi estas versaĵoj."

"Ĉu ili estas skribitaj per la manskribo de la juĝato?" demandis alia ĵurinto.

"Ne" respondis la Blanka Kuniklo "kaj jen la plej nekomprenebla afero."

Ĉe tio la mienoj de la tuta ĵurintaro proklamis plenan konfuziĝon.

"Do, li nepre imitis *ies* manskribon" diris la Reĝo. (La mienoj de la ĵurintoj reheliĝis.)

"Se plaĉas al via Reĝa Moŝto" diris la juĝato mem "mi ne skribis ĝin, kaj neniu povas pruvi ke mi skribis ĝin. Ĝi ja ne estas subskribita ĉe la fino."

"Se vi ne subskribis" diris la Reĝo "tio nur pligravigas la ofendon. Vi nepre *intencis* ian